



aktuala

35-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N° 0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsimirkos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Eltiro 200 ekzempleroj. In formoj: ... <http://users.belgacom.net/EBG>; ebg.skynetblogs.be; xurb.leadhoster.com; esperanto.net; esperanto.be; le.rnu.net; uea.org; liberafolio.org; eo.evente.net; sites.google.com/site/ebgaktuala; sites.google.com/site/panb2001

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Probal Dasgupta, prezidanto de UEA, al Lingva Kunfluo
- Paĝo 4 - Poemaro, Alberto Garcia, Miša Bronštejn, Raymundo Sousa
- Paĝo 5 - Jacob Hasbun kun Araba Noveleto 14
- Paĝo 6 - Litovaj Popolaj Fabeloj; Leperoj kaj Gabrovanoj
- Paĝo 8 - Mikko Mäkitalo pri Krimaj Novaĵoj el Finnlando; Proverboj
- Paĝo 10 - Esperantaj Eventoj, Casquero kaj Sossois raportas
- Paĝo 12 - Renato Corsetti pri Esperanto estus Turka
- Paĝo 14 - Orellana neas fraŭdon; 97a U.K. 2012, Hanojo, Vjetnamujo
- Paĝo 16 - Liba Gabalda pri Ni Festis en Skokovy

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Majo 2010

- 5 Semajna kunveno
- 12 Nora Caragea pri sia esperantigo de libroj (*anstataŭ Hélène Falk-Bracke*)
- 19 Semajna kunveno
- 26 Bernard-Regis Larue pri sur la vosto de kometoj

Junio 2010

- 2 Semajna kunveno
- 9 Bernard-Regis Larue pri ĉu la ĉielo falos sur niajn kapojn (*anstataŭ 23-06*)
- 16 Semajna kunveno
- 23 Vespermanĝo finlernajara en kutima restoracio Rugantino (*18h30 tie*)
- 30 grupo ferias kaj ankaŭ en Julio kaj Aŭgusto kaj duono Septembro

Septembro 2010

- 15 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 22 Semajna kunveno
- 29 Semajna kunveno

DASGUPTA AL LINGVA KUNFLUO

La Prezidanto de UEA ricevis inviton al la konferenco "Bhasha Kunfluo", kiun okazigis en marto 2010 la Bhasha Esplora kaj Publika Centro kun pli ol 3000 partoprenantoj, parolantaj diversajn baratajn lingvojn. Ĉar pro aliaj devoj prof. Dasgupta ne povis ĉeesti en la Kunfluo, li sendis al ĝi jenan skriban mesaĝon.

Estimataj kunfluanoj :

Ke vi ĉiuj estas ĉi tie, por festi la diversecon de la lingvoj de Barato, estas jam per si mem grava atingo, kaj nia unua devo - mi diras 'nia' ĉar iuj el ni, kiuj ne povis veni, tamen anime ĉeestas kun vi - estas danki al Ganesh Devy kaj aliaj kunorganizantoj, kiuj ebligis tiun ĉi trafon. Tio, ke ili estas sukcesaj organizantoj de kunfluo, signifas ke ili scipovas ĝin transdoni al ĉiuj, kiuj partoprenas, tiel ke malakriĝu la limo inter organizantoj kaj partoprenantoj.

Barato estas lando de malakriĝintaj limoj. Ni eksplicite difinas la limojn, kaj poste ni ilin aliformatigas kiel intertrakteblajn duonrealaĵojn. Tio ĉi estas arto. Ĝi savtenas nian kulturen diversecon - eĉ la aborigenajn lingvojn, kies pluivado nek en la antikva nek en la moderna Barato ricevis ajnan formalan apogon de la strukturoj de la kodigado. Luj inter ni nun komencas forgesi, kiel do konservi la intertraktan pluralecon sur spontana nivelo. Tial la arto de la pluraleco nun fariĝas arto, kiun ni devas memkonscie lerni kaj praktiki. Nia kapablo publike debati kaj tezumi devas sin altigi renkonte al la okazo. Ni bezonas zorge formuli la koordinatojn de la intertrakta pluraleco. Nur tiam ni trafos alfronti la defion en ties hodiaŭa, akutiĝinta versio.

La institucioj de la klerigo, kaj de la formalsektora mensa laboro por la klerigintoj, povas esti uzataj por estigi

disduigon de la elito disde la popolamasoj; tion ni demonstris per nia praktiko. La agadkajero de nia lando montras, ke tiaformata lerneĵado tenas la aborigenajn lingvojn en stato de porĉiama senvoĉdoneco. Multaj inter ni, ne estante aborigenoj, trovas tion tute akceptebla, ĉar ni enamiĝis al la sukcesrakonto de la ĉefa fluo de la moderna Barato.

Venis jam la tempo por fronti al la defio demonstri, ke ni kapablas fleksi la klerigejojn - kaj tiujn ekonomiajn entreprenojn, en kiuj laboros, plenkreskinte, niaj klerigitoj - tiel draste, ke ili povu estigi trans tiu disduiga limo amikecon kaj ne malafablemon. Fleksi ilin tiel draste, ke ĉiujn malgrandajn lingvojn ili sukcesu movi en la lumon kaj ne puŝi en la mallumon. Fleksi ilin tiel draste, ke nia sistemo de literatura eldonado komencu liberfluigi la energiojn de la buŝaj tradicioj de la barataj aborigenaj socioj, de la rakontoj kaj versaĵoj, kiujn niaj virinoj iam kundisponigis nur inter si sed nun konsentos dividi kun nove sentemiĝinta kaj interesiĝanta publiko, kaj de ĉio alia, kion la preseĵado en la pasinteco forbaris for de la publika rigardo. Estas nia tasko ankaŭ nian publikon tiel fleksi, ke tiu publiko kunkreskos kun la institucioj, cele al tia konsterna inkluzivemo, ke nur tiu, kiu vidos ĝin, kredos pri ĝia ekzisto.

Profesie dirite, mi laboras en la komunumo de la barataj lingvistoj; ke ni havas iun Khubchandani, iun Annamalai, iun Kelkar aŭ iun Bhat donas al ni multajn kialojn por priferi nian pli aĝan generacion, kaj iuj el la pli junaj lingvistoj jam demonstris sian kapablon je la scienca rigoro kaj la demografia inkluzivemo. Mi esperas, ke la publiko de Barato, kiu ofte ne tute komprenis al kio povas servi la lingvistoj, komencos percepti, ke la unika mozaiko de lingvoj

kaj kulturoj en tiu ĉi nacio meritas, ke oni aprezu ĝian valoron; kaj ke la lingvistoj povas helpi nin fronti al la defio konservi kaj kultivi tiun ĉi trezoron.

Mi parolas ankaŭ por la komunumo de la uzantoj de la lingvo Esperanto, la lingvo fasonita por rapida lerno kiu servas kiel maksimume neŭtrala ponto inter lando kaj lando, inter popolo kaj popolo. La Esperanta komunumo rezolute celas konservi la riĉecon de la lingvoj de la mondo, donante prioritaton al la malpli grandaj komunumoj. Jen kial tiaj senlacaj agantoj por la lingvoj de malplimulto, kiel Tove Skutnabb-Kangas kaj Robert Phillipson, estas kun ni.

Formale dirite, mi verkas ĉi tiun mesaĝon kiel la nuna prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, neregistara organizaĵo en operaciaj rilatoj kun Unesko kaj havanta aliĝintajn landajn asociojn en sepdek landoj. La advokato por komunumoj, kies lingvaj rajtoj estas malobservataj, fariĝis la ĉefa temo en niaj intervenoj ĉe Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj. En 2008, ni okazigis simpozion pri la lingvaj rajtoj en la ĝeneva oficejo de UN por festi nian propran centjariĝon kaj la sesdekjariĝojn de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Nia festpreleganto estis Tove Skutnabb-Kangas; ni estis kontentaj liveri forumon ankaŭ al reprezentantoj de indiĝenaj popoloj, kiuj tie prezentis tezojn pri sia rajto konservi la kulturen kaj intelektan riĉecon de siaj lingvoj.

Esperanto estas grava tradukilo, kiu ebligas la komparadon de spertoj inter la agantoj por la lingvoj de malplimulto en la tuta mondo, kaj por diskonatigi inter tiuj komunumoj same la kulturen kaj lernaĵan diversecon de niaj artoj kaj scioj, kiel la fundamentan unuecon de la homaj valoroj. Tio ĉi liveras fortikan bazon por la paco; Esperanto estas esence

pacmovado kun lingva vizaĝo. Ne estas vaste konate, ke en 1921, kiam Barato estis plenrajta membro de la Ligo de Nacioj, Barato kune kun Argentino, Persujo kaj kvar aliaj nacioj lanĉis la ideon, ke oni mondnivele adoptu Esperanton. Post kiam la tiama Vica Sekretario de la Ligo, Inazo Nitobe, ekzamenis la demandon kaj verkis favoran raporton, Barato kunproponis formalan rezolucion favore al Esperanto; ĝin paffaligis franca vetoo, kun postkulisa kompliceo de la britoj.

Ŝajnas al ni en la Esperanta mondo, ke la baratanoj de hodiaŭ, fronte al la defio konservi la riĉan lingvan kaj kulturen mozaikon de Barato, devus konsideri la eblon aldoni Esperanton al sia ilaro - almenaŭ sur la nivelo de la komuna luktado, por kiu de longe lobiadas la esperantistoj, kaj ankaŭ sur la nivelo intelekta kaj arta. Kontraŭe al tio, kion pensas multaj, fakte nia movado laboras en intima kunagado kun multaj geamikoj, kiuj ne lernis specife la Esperantan lingvon; Esperanto estas ankaŭ kulturo; ĝi estas kuirarto, instruanta al ni ŝati la estetikan diversecon, kiu vestas nian homaran unuecon.

Mi dankas pro via atento. La komunumoj, kiujn mi reprezentas, sendas al vi bondezirojn por sukcesa kunfluo kaj por serioza kaj daŭranta prisekvado. Bonvolu informi nin, kiel povas helpi ni lingvistoj kaj ni esperantistoj.

Via, Probal Dasgupta ([en Gazetaraj Komunikoj de UEA](#))

RUGANTINO 23AN JUNIO 18H30

Ni intencas, la gelernantoj de la unua kaj dua grado (*de Esperantista Brusela Grupo*), festi la jar-finon per manĝaĵo en la itala restoracio 'Rugantino', merkredon la 23an de junio. Ni rendevuos, tie, je la sesa kaj duono. Necesas sin anonci ĉe mi ne tro malfrue, t.e. antaŭ la komenco de junio.

Françoise Pellegrin

MEDITOJ

Se rigardas en l' historio vi lerte observos rapide, kiel l' vivo, haste-avide pasas, kiel suna radio plena da luma energio. Estas efemera momento la vivo: kiel en la vento, nedaŭra suspiro; nebulo sub la suno: uraganululo; aŭ, fuĝ-stelo en la firmamento.

De l' ne ĉeesto kaj la ekzisto disigas nin preskaŭ nenio; en ĉi senfina agonio, nasko kaj morto, kun persisto, dancas tra la tempo, ho Kristo!, anstataŭiĝante konstante inter mortintoj stertoroj, ĵus naskitaj ploro-doloroj, kaj obstinaj ĝerموj, plendante.

Apenaŭ l' homo en l' nenio de sekreta nokto naskiĝas, kiam tre rapide mortiĝas pro senvitala energio en senĉesa morta devio. Pri ĉi tiu tragika sorto de la vivo kaj de la morto, mia racieco meditas, dum mia animo hezitas, mankante al mi vibra vorto.

En mia anima silento mi pensas pri ironio: "ĉi tiu nedaŭra momento ĉu estas vivprivilegio aŭ terurega vivevento, kaj, se l' donacon de ĉi ĉio, kiu estas mia vivsento, mi ŝuldas ĝin, al kiu Dio?".

Alberto Garcia Orive,
Bilbao, Hispanujo,
Marto 2010

AL ...

Apenaŭ flagranta aŭror'
la alojn vastigas dum veno, -
la korojn denove
incitas bontrove
printempa mateno.

Apenaŭ dorminta konval'
ektremos pro l' venta impeto, -
la vangojn lumigos,
l' okulojn varmigis
feliĉa rideto.

Apenaŭ sopira anim'
vekiĝos post vintra amaro, -
ĝin trafos kontente,
okupos plensente
la freŝo de l' marto.

Kaj dance alflugas la tag',
kraĉante al sobro, prudento.
Jen tiel flamigas,
jen tiel amigas
la mart' kaj la vento.

Miŝa Bronŝtejn,
Tiĥvin, S.Petroburgo, Rusujo, Marto 2002

LA REVULO

oni amas, oni revas, oni ridas,
ĉiam pensante
ke la vivo
estas eterna florado.
sed kiam oni eliras
el niaj revoj,
oni suferas,
oni ploras,
kaj vidas,
ke en la vivo,
restas al ni
nur konstati
ke la vivo
estas eterna mensogo.
Raymundo Souza, Brazilo

ARABA NOVELETO 14 (7a-13a jarcentoj)

Abu-I-Hasani bin Hilali ibnu-I-Hasani as-Sabi rakontis en sia « Historio », ke certa komercisto raportis al li jenon :

Mi restadis ĉe la kampadejo. Okazis iam, ke la sultano Ĝalalu ad-Daŭlato, laŭ sia kutimo, estis rajdonta ĉasi, kiam venis renkonte al li ploranta kamparano. Li diris : « Kiel estas al vi ? » Li respondis : « Tri junaj servistoj alflankiĝis al mi kaj kaptis citrol-ŝarĝon, kiu estis kun mi. Ĝi estas mia tuta komercaĵaro ! » Li diris lin : « Eniru en la kampadejon. Tie kuŝas ruĝa tendo ; sidiĝu apud ĝi senhalte ĝis la tagofino. Mi revenos kaj donos al vi tion, kio riĉigos vin. » Reveninte, la sultano diris al unu el siaj proviantistoj : « Mi deziras citrolon. Priserĉu la soldatojn kaj ties tendoj por trovi iom da ĝi. » Tion li faris, kaj reveninte prezentis citrolon al li. La sultano demandis : « Ĉe kiu vi trovis ĝin ? » Li diris : « En la tendo de tia-tia, la ĉambelano. » Li diris lin : « Voku lin al mi. » Li demandis lin : « El kie, ĉi citrolo ? » Li respondis : « La servistoj alportis citrolojn. » Li diris lin : « Mi volas vidi tiujn servistojn tuj. » La ĉambelano foriris, antaŭflaranta danĝeron. Li forkurigis la servistojn pro timo, ke ili estos mortigitaj. Reveninte, li diris : « Ili forkuris tuj post, kiam mi sciigis al ili la vokon de la sultano. » Li diris lin : « Revenigu la kamparanon. » Oni revenigis lin. Li demandis lin : « Ĉu ĉi citrolo apartenas al tiuj, kiujn estis forprenitaj de vi ? » Li respondis : « Jes. » Li diris lin : « Prenu ĝin. Kaj tiun ĉambelanon, sklavo mia, mi fordonas al li kiel regalon mian tiom longe, kiom la kaptistoj de viaj citroloj ne aperos antaŭ mi. Kaj, per Allaho !, se vi liberigos li, mi tranĉigos al vi la kolon. » La kamparano prenis la ĉambelanon je la mano kaj elirigis lin. La ĉambelano elaĉetis sin per pagado de tri cent dinaroj. La kamparano venis ree al la sultano kaj

5
diris al li : « Ho, sultano !, mi ĵus vendis la mamlukon, kiun vi donacis al mi, pro tri cent dinaroj. » Li demandis lin : « Ĉu tio kontentigas vin ? » Li diris : « Jes, ja. » La sultano : « Enpoŝigu la dinarojn kaj eliru serenece ! »

Ibnu al-Ĝaŭzijo, Libro de la inteligentuloj,
Jacob Hasbun, membro de EBG, elarabisis

RIDINDAJ ŜERCAJ NOVELETOJ

DUBINDA SAĜECO

Du malsanuloj kuŝas samĉambre en la kirurgia fako de la malsanulejo. Ambaŭ suferas de doloroj pro malsano ĉe la gambo. Matene alvenis la kuracisto. Li iris al Aldo, prenis lian gambon, palpis kaj premis ĝin forte, batetis ĝin per iu instrumento kaj igis la pacienton forte kriegi pro doloroj. Poste li iris al Beto, prenis lian gambon kaj faris la samon. Sed Beto ne nur ne kriis sed eĉ ne aŭdigis voĉon. Post la foriro de la kuracisto diris Aldo al Beto: "Mi ege envias vin pro tio ke vi sukcesas toleri la dolorojn kaŭzitaĵojn de la doktoro." Beto: "Temas nur pri saĝo!". Aldo: "Pri kio vi parolas?" Beto: "Ĉu mi estus tiel stulta ke mi donu al li la dolorantan gambon?"

LI ANKAŬ POVAS

En cirko juna kaj bela dresistino tenas inter siaj lipoj pecon de sukero kaj leono prenas la sukero el ŝia buŝo .

-Tion ankaŭ mi povas fari! - deklaras laŭte juna sinjoro.

- Vi? - demandas fiere la dresistino.

- Jes, jes! Egale bone kiel la leono.

ELEKTEBLO

- Sinjoro, ĉu vi petas vespermanĝon? -- demandas stevardino la pasaĝeron.

- El kio eblas elekti?

- El jes kaj ne.

Aleks Kadar, Parizo, Francujo

6

NOVELO PRI OVO DE ĈEVALINO

En nia vilaĝo ĉe arbaro loĝis onklo Tio. Li havis du gefilojn, Primo kaj Sekundo. Ili kaj mi estis amika triopo, kune ludis kaj vizitis lernejon. En la tuta ĉirkaŭaĵo oni konis onklon Tion kiel gajan rakontiston kaj ni tre ŝatis aŭskulti liajn ridindajn rakontojn. Jen unu historio pri lia bopatro, kiu en sia juneco estis ĝardenisto ĉe riĉa urbestro, kaj fariĝis vilaĝano.

Unu fojon eksĝardenisto kreskigis grandegan melonon, metis ĝin en veturilon kaj forveturis al bazaro por vendi. Alvenas iu urba sinjoro kaj rigardas nevidintan aĵon.

- Kjo ĝi estas? - demandas li.

- Ĉu vi ne vidas, ke tio estas ovo de ĉevalino? - respondas ŝercema vendanto eĉ ne palpebrumante.

- Ĉu mi ne misaŭdis? Ĉu ĉevalinoj metas ovojn? - ekmiris la sinjoro.

- De pratempoj tio estas konata, - plu ŝercas la vilaĝano vidante, ke la demandanto estas stulteta.

- Kaj ĉu el tiu ovo oni povas elkovi ĉevalidon? - interesiĝas la sinjoro, al kiu ĉevalo estis aĉetenda.

- Kompreneble jes! Kaj ne ian ajn ĉevalaĉon, sed belegan rajdĉevalon. Vi nur bezonos pacience sidi sur la ovo dum tuta monato, - klarigis la ruzulo al la kredema aĉetonto.

Pripensis la sinjoro, ke la ovo kostas malpli ol ĉevalo, kaj demandas pri la prezo.

- Nur unu arĝenta monero, sinjoro.

Tiu elpoŝigas monujon kaj pagas dekoble pli ol la melono valoras.

Reveninte hejmen la aĉetinto komencas kovi "la ovon". Pasas duono de monato, pasas la dua, sed neniu ĉevalido aperas. La melono jam disvastigas malbonan odoron... Ankoraŭ post kelkaj tagoj la sinjoro perdis la esperon kaj eksentis sin trompita.

- Malbena falu sur tiun fihomon! Tio ja estas banditismo! Nu, revidu mi lin ankoraŭfoje! - kolerigis la trompito kaj frapadis tablon per kandelingo.

Prenis li la melonon kaj forĵetis en arbuston. Sed en la arbusto dormis

leporo, kiu nun timigita eksaltis kaj forkuris arbaren. Tamen la sinjoro ekpensis, ke tio el krevita ovo elsaltis la ĉevalido, do li postkuris ĝin kriante:

- Stop! Haltu! - sed nenio helpis.

- Ho, kia malpacienca mi estis. Se mi kovus la ovon ankoraŭ unu tagon, kian rapidan ĉevalidon mi nun posedus... - malgaje meditis li revenante hejmen.

Litova popola fabelo

SERĈI PERDITAN ĈEVALON

Iu komercisto perdis ĉevalon. Li serĉadis en multaj lokoj, sed ne trovis ĝin. Li falis en grandan maltrankvilon. Tiam li vidis maljunulon iranta antaŭ li. Li tuj iris al li kun demando:

"Sinjoro, ĉu vi vidis ĉevalon?"

"Ĉu vi demandas pri ĉevalo lama je maldekstra piedo?" demandis la maljunulo.

"Jes," respondis la komercisto.

"Ĉu ĝi portas mielon maldekstre kaj rizon dekstre?"

"Jes, prave."

"Ĉu ĝi jam perdis unu denton?"

"Ho, tute vere. Kie vi vidis ĝin?"

"Ne, mi ne vidis ĝin," respondis la maljunulo.

"Ne trompu min, certe vi kaŝis la ĉevalon. Alie vi ne povus scii tiel detale pri ĝi!" la komercisto koleriĝis.

La maljunulo respondis senhaste: "Ne koleru, sed aŭskultu mian klarigon. Ĵus mi vidis ĉevalajn piedsignojn sur la vojo kaj trovis, ke la dekstraj piedsignoj estas pli profundaj ol la maldekstraj. Krome mi vidis, ke maldekstre de la vojo estas mielo, kaj dekstre rizgrajnoj. Tiam mi certigis, kion la ĉevalo portas. Mi rimarkis, ke la folioj, kiujn la ĉevalo mordis, surhavas dentosignojn, kaj tio montras, ke la ĉevalo jam perdis unu denton. Sed mi ne scias, kien iris la ĉevalo. Vi devas serĉi ĝin laŭ ĝiaj piedsignoj."

Laŭ la konsilo de la maljunulo la komercisto trovis sian ĉevalon.

Litova popola fabelo

NOVELO PRI ŜTELITA ĈEVALO

Riĉa terkultivisto havis kelkajn ĉevalojn. Ĉiuj ili estis belaj, sed unu estis la plej bela el ĉiuj.

Kiam ĝi kuris, la tero tremis, kaj kiam ĝi henis, tion oni aŭdis en naŭa parofo...

Kaj fieris la mastro pri tiu ĉevalo, sed ne longe.

Nokte, kiam la tuta familio trankvile dormis, venis ŝtelisto kaj forkondukis la belan ĉevalon el la stalo. La mastro tri tagojn serĉis la beston, sed nenie trovis.

Post tri tagoj li veturis en bazaron por aĉeti novan ĉevalon.

Promenante li ekvidis inter aliaj ĉevaloj ankaŭ la sian. Nenion atendente la mastro kaptis la ĉevalon je brido kaj diris:

- Tiu ĉevalo estas mia! Antaŭ tri tagoj ĝi estis ŝtelita el mia stalo!

La ŝtelisto trankvile respondis:

- Kara amiko, ĉi-foje vi malprave suspektas min. Tiu ĉi ĉevalo jam du jarojn estas ĉe mi. Via ĉevalo eble estas nur simila al tiu ĉi.

Tiam la mastro rapide kovris per la manoj ambaŭ okulojn de la ĉevalo kaj diris:

- Ĉar vi jam antaŭlonge posedas la ĉevalon, diru, per kiu okulo ĝi ne vidas?

Nun la ŝtelisto ne povis silenti, li devis ion diri kaj, dezirante aspekti senkulpa, diris:

- Per la maldekstra ĝi ne vidas.

- Ne vere, - diris la mastro. - Ĝia maldekstra okulo estas plene sana! - kaj li malkovris la maldekstran okulon.

- Ne, ne, - respondis la ŝtelisto, - mi la vortojn miksis, ĝi ne vidas per la dekstra okulo.

- La ĉevalo entute ne estas blinda! - ekkriis la mastro kaj fortiris la manon de la dekstra okulo.

La ŝtelisto povis nenion plu diri. Li estis arestita kaj punita.

Kaj la mastro rekondukis hejmen sian ĉevalon kaj veturadis per ĝi kiel antaŭe.

Litova popola fabelo

7

LEPEROJ KAJ GABROVANOJ

Leperoj (tio estas loĝantoj de urbo Lepe en sudokcidenta Hispanujo), tiel kiel Gabrovanoj (tio estas loĝantoj de urbo Gabrovo en Bulgarujo), famiĝis pro sia ridikulemo, ridindemo, ŝparemo kaj kalkulemo. En tiuj urboj ĉiun jaron okazas festivalo de humuro kaj satiro, kie partoprenas humoristoj el la tuta mondo. Interese, anekdotoj estas oftaj la samaj pri la unuj kaj la aliaj. Ni konatiĝu kun kelkaj trajtoj de karaktero de leperoj kaj gabrovanoj el la kolekto Anekdotoj pri Grabovanoj tradukita de Neno Janev.

- Oni rakontas, ke gabrovanoj nokte haltigas la horloĝojn por ke ili ne eluziĝu vane.

- Ili tranĉas vostojn de katoj por ke tiuj pli rapide pasu tra malfermitaj pordoj vintre kaj varmo ne eliru el ĉambroj.

- Ili fendas alumeton en du partojn por ke ĝi estu dufoje uzata.

- Kiam gabrovano ion aĉetas, li postulas, ke oni enpaku ĝin en novan gazeton.

- Gabrovanoj lavas tiel ekonomie, ke la vestoj estas lavitaj, la sapo restas tuta kaj akvo klara.

- **Senpaga konsilo:** Esperante ricevi senpagan kurackonsilon, gabrovano haltigas surstrate sian najbaron kuraciston kaj demandis:

- Doktoro, kion vi faras, kiam vi havas nazkataron?

- Mi ternas, - respondis la kuracisto, kiu same estis gabrovano.

- **Leciono de ŝparemo:** Gabrovano aĉetis por sia filo novajn ŝuojn. La sekvan tagon la tuta familio iris gaste al parenco. Surstrate la gabrovano demandis la filon:

- Ĉu vi marŝas kun la novaj ŝuoj?

- Jes, paĉjo.

- Bone, sed faru pli larĝajn paŝojn! Konsilis la patro.

- **Nur mustardon:** Gabrovano aĉetis kolbason. La vendisto pakis ĝin kaj aldonis tubeton de mustardo.

- Sed mi ne petis mustardon! - kontestis la gabrovano.

- Ĝi estas senpaga aldono al la kolbaso.

- En tia okazo donu nur la mustardon.

8

KRIMAJ NOVAĴOJ EL FINNLANDO

Vico da amasaj mortigoj diskutigas Finnlandon. Unue estis eksplodo en komercejo Myyrmanni en oktobro 2002. Mortis sep homoj kaj vundiĝis preskaŭ 200. Tio estis nur unuopa okazo fare de frustriginta juna viro.


Venis pafado en lernejo de Jokela en novembro 2007. Mortis naŭ homoj, inkluzive la pafinton, kiu post mortigi aliajn mortigis sin mem. Ankoraŭ oni ne vidis multan kaŭzon ligi ĉi tiun okazon kun tiu en Myyrmanni.

Venis pafado en metilernejo de Kauhajoki en septembro 2008. Mortis 11 homoj, inkluzive ĉi tie same la pafinton mem. Oni jam komencis diskuti, ĉu estas io profunde malorde en la finna socio, ĉar ripete okazas amasaj mortigoj. Ankaŭ eksterlande Finnlando jam akiris ioman tristan famon: ĝi estas lando de koleraj junaj viroj, kiuj izolas sin el la normala vivkomunumo kaj per interreto disvolvas detruajn planojn - pli-malpli tion ĉi tiuj tri uloj ĉiuj faris.

Nur plia jaro daŭris kaj venis pafado en komercejo Sello en la lasta tago de jaro 2009. Mortis kvar homoj tie, kaj en aliaj lokoj la pafinto mortigis sian ekskarulinon kaj sin mem. Denove Finnlando staris en rubrikaj de ĵurnaloj en aliaj landoj pro esti okazejo de amasaj mortigoj. Oni ne povas nei, ke Finnlando staras proporcie kun sia loĝantaro nenature alte en la statistikoj.

lun tre unuecan tipon la kvar okazoj ne reprezentas. La Myyrmanni-okazo distingiĝas de la aliaj tiel, ke ĝi estis farita per bombo, dum la aliaj per pafado, kaj oni ne scias, ĉu la farinto intencis mem morti, ĉar klaran memmortigan mesaĝon oni ne trovis, kaj fine oni konkludis, ke la bombo eksplodis akcidente per malfunkcio de la iniciata mekanismo. La Sello-okazo distingiĝas de la aliaj en multaj aspektoj: Ĝia farinto ne estis tiom juna kaj aktiva

uzanto de interreto, kiel la tri aliaj, kaj li havis personan motivon kontraŭ sia ekskarulino, dum la tri aliaj havis pli ĝeneralan haton kontraŭ la komunumo, kie ili sentis sin mistraktitaj. Klaran inter si similtantan paron formas nur la okazoj de Jokela kaj Kauhajoki, sed el tiuj ni ja scias, ke la farinto de la posta konscie imitis la farinton de la unua.



Mikko Mäkitalo ; <http://www.esperanto.fi/>

Unu komuna trajto estas, ke ĉi tiuj kvar kulpuloj estis ĉiuj viroj. Sed facile oni povas memori pri jaro 1999 kaj okazo, kiam virino en Helsinko mortpafis grupon da homoj. La kvanto da viktimoj restis en tri, sed laŭ sia tipo tiu pafado estas tre ekvivalenta. Nenia novaĵo ja estas, ke virinoj faras krimojn, speciale violentajn kaj mortigajn krimojn, malpli ol viroj.

Plian trajton en la debatojn post la Sello-okazo portis la fakto, ke ĝia farinto ne estis denaska finno, li estis enmigrinto el Kosovo - kaj ne akirinta finnan civitanecan pro faritaj krimoj. Pro tio ja nepra fenomeno estis, ke iuj proklamis, ke nun la enmigrintoj kunportas siajn malbonajn kutimojn en Finnlandon kaj detruas la pacan finnan socion. Postulata estis, ke oni sendu ĉiujn krimozajn eksterlandanojn for el al lando. Sed en tio ja oni devis forgesi, ke Finnlando jam antaŭ la okazo de Sello elstaris en la statistikoj pri mortigaj krimoj. Alia ekstremo de la debato

PROVERBOJ KAJ DIRAĴOJ
KUN VORTOJ PRI TEMOJ:
NOMO, LANDO, REGNO, LIMO, POPOLO

estis aserti, ke tiel eĉ enmigrinto adoptas la tipan finnan agmanieron kaj post siaj frustrigoj mortigas aron da homoj.

Krimstatistikoj inter diversaj landoj estas tre malfacile kompareblaj, pro multaj kaŭzoj, ekzemple: En iuj landoj serio da krimoj faritaj de unu homo kalkuliĝas unu, en aliaj landoj pluraj; En iuj landoj krimo enskribiĝas en statistikojn nur post juĝo, en aliaj landoj jam pro anonco al la polico; Nivelo de puno por la sama ago diversas en diversaj landoj; Emo de homoj anonci rimarkitan krimon al polico diversas en diversaj cirkonstancoj. Sed kiom oni povas konsideri la statistikojn fideble kompareblaj inter Finnlando kaj aliaj landoj, kiuj kredeble havas proksimume similajn cirkonstancojn, t.e. ĉefe Svedio kaj aliaj nordiaj landoj, unu tendenco videblas: En Finnlando okazas pli multe mortigoj kaj aliaj violentaj agoj. Kaj aliflanke, pri Svedio oni scias, ke la finndevenaj loĝantoj faras tiujn krimojn pli ol ceteraj loĝantoj. Ili estas malbone en la finna menstipo: ni estas ĝenerale trankvilaj homoj kaj ne facile komencas kvereli, sed samtempe ni estas malbonaj en diskutado, speciale pri niaj personaj problemoj. Post akumulado de malicaĵoj ni agas violence.

Kiel ajn estas la statistikoj kaj averaĝoj, oni ne povas juĝi homojn per ili. Ĉiu krimulo aŭ eventuala krimulo estas individua kazo kaj bezonas individuan juĝon aŭ kuracon.

Estas facile diri, ke oni sendu krimozajn eksterlandanojn for el la lando. Tion ja oni ankaŭ faras. En ekstremo tio tamen rezultus, ke ni ĉiuj sendus violentajn homojn el propra lando al alia, kaj tiel oni ne solvas la bazajn problemojn. La oficialuloj devas havi kongruan sistemon en tio, kaj sekvi la leĝojn faritajn por tio. Kaj speciale indas konsideri, ke se Svedio volus sendi ĉiujn finndevenajn krimulojn en Finnlandon, tiam ni havus problemon.

Almenaŭ la ripetigo de mortigaj okazaj kaŭzis en Finnlando vastan diskuton pri sekureco, leĝo pri pafiloj kaj mensa malbonfarto kaj ĝia traktado. Ŝanĝo de leĝo pri pafiloj estas preparata kaj kutimoj de la polico en permesoj por aĉeti pafilon verŝajne ŝanĝiĝas. Perfektan sekurecon la socio atingas neniam, sed ia progreso estas antaŭvidata.

Mikko Mäkitalo, Finnlando

Kia estas la homo, tia estas lia **nomo**
 Laŭ la agoj de l' homo estas lia **nomo**
 Malsaĝulo ĉie sian **nomon** skribas
Nomo egala, sed esenco mala
 Por hundon dronigi, oni **nomas** ĝin rabia
 Unu fojon ŝtelis pomon ...

... kaj perdis por ĉiam honestan **nomon**
 Mankis al **Petro** klopodoj, li aĉetis al si domon
Petro kornojn tenas, **Paŭlo** lakton prenas
Petro parolas sen direkto, sed **Paŭlo** konjektu
Petro rifuzas, **Paŭlo** ekuzas
Petron kruro doloras, **Karolo** ne lamas
 Por **Paŭlo** sperto, por **Petro** averto
 Se **Peĉjo** ne semos, **Petro** ne rikoltos
 Vizaĝo de **Katono**, sed virto de fripono
 Kiso antaŭ amaso estas kiso de **Judas**
 Ne ĉiam estas sankta **Johano**

Amu **Antonon**, sed gardu vian monon
 Demeti de si la antikvan **Adamon**
 Komenci de **Adamo**
 Parenco per **Adamo**

Bona estas fremdlando, sed aliaj tie loĝu
 En **landoj** transmaraj estas oraj arbaroj
 Fremdlando objekton por speso donas, ...
 ... sed por ĝin venigi, oni spesmilon bezonas
 Peto kaj demando kondukas tra l' tuta **lando**
 Pri **lando** malproksima estas bone mensogi
 Por **regna** speso ne ekzistas forgeso

Regna kaso — bona ĉaso
 Fremda animo estas abismo sen **limo**
 Klopodi sen **limo** per korpo kaj animo
 Malpaco pro **limo** fariĝas kutimo, ...

... malpaco pro kredo fariĝas heredo
 Pensoj iras trans **limo** sen pago kaj timo
 Pro **limoj** kaj baroj malpacas najbaroj
Popola kutimo havas valoron de leĝo
Popolo diras, Dio diras

Venas proverbo el **popola** la cerbo
France saĝa, **angle** sovaĝa
 Formeti ĝis la **grekaj** kalendoj
 Ĝi estas por mi **hina** scienco
 Aŭskulti kiel **hinan** predikon

Rob Keetlaer en proverbaro.net

ESPERANTAJ EVENTOJ



Demianenko prelegis la 21-an de Aprilo en E.B.G.



Michael Cwik, membro de EBG, la 1-an de Majo festegis sian 70an naskiĝdatrevenon: <http://xurb.110mb.com/100501/>



Beneluxa Kongreso okazis la 13-16an de Majo en Antverpeno

NOVAJ AKADEMIANOJ

Kandidato al la Akademio devas esti proponita de almenaŭ kvin akademianoj, kiuj havas almenaŭ tri malsamajn gepatrajn lingvojn. La kandidato devas deklari, ke li estas "fidela al la Fundamento", kaj ke li konsentas konstante kunlabori en la Akademio. Ĉiun trian jaron unu triono de la membroj estas submetata al rebaloto. En la ĵusa elekto voĉdonis sume 39 akademianoj. Por naŭjara oficperiodo estis (re)elektitaj la jenaj personoj (la voĉnombro aperas interkrampe, nova akademiano estas indikita per grasa teksto): Benczik Vilmos 28; **Marcos Cramer** 26; Probal

Dasgupta 34; Miguel Gutierrez Aduriz 24; **Lena Karpunina** 29; Boris Kolker 38; Erich-Dieter Krause 28; Li Shijun 35; **Stano Marček** 30; Carlo Minnaja 36; **Paŭlo Mojajev** 25; **Alexander Shlafer** 28; Humphrey Tonkin 38; Bertilo Wennergren 38; YAMASAKI Seikō 31. Ĉiuj kandidatoj estis elektitaj. Finiĝis la oficperiodo de la jenaj kvin akademianoj, kiuj ne rekandidatis: Aŝvinikumar; André Cherpillod; Gersi Alfredo Bays; Flavio Rebelo (nekontaktebla); Trevor Steele.

Libera Folio, la 28an aprilo 2010

AŬGUSTO 分发作业 INAŬGURAS



Kurso de Esperanto en la ĉina universitato Baiyun estis inaŭgurita. La 7an de majo, en la ĉina urbo Kantono, okazis la inaŭguro de Kurso de Esperanto, en la Universitato Baiyun. Dum la malferma ceremonio oni laŭtleĝis, far du gestudentoj, la salutmesaĝojn de landaj kaj internaciaj e-organizaĵoj. Partoprenis krom la studentaro kelkaj lokaj esperantistoj, kaj reprezentantoj de la Universitato Baiyun. Mallongajn prelegojn faris s-ro Petro Ye, (Vicprezidanto de la Esperanta Asocio de Kantono); s-ro Aŭgusto 分发作业 Casquero de la Cruz (hispana esperantisto) kaj s-ro Dai Shengqiao (ankaŭ profesoro de tiu universitato, organizanto de la kurso, kaj ties instruisto). La tuta ceremonio estis kortuŝiga, kaj la ĉeestantoj kaj gelernantoj montris grandan entuziasmo lerni la internacian lingvon E-o. Fine oni kantis la himnon de Esperanto "La Espero". Tio certe estas kaj estos kuraĝigo por tiu kaj por aliaj ĉinaj universitatoj kaj lernejoj.

Aŭgusto 分发作业 Casquero de la Cruz, Ĉinio

AŬGUSTO 分发作业 RAPORTAS



Memore al Zamenhof en Popola Ĉinio la 17an de aprilo oni rememoris D-ron Zamenhof, okaze de la datreveno de lia forpaso, la 14an de aprilo. La aranĝo okazis en la sidejo de la Esperanta Asocio de Kantono, Ĉinio. Kelkaj samideanoj prelegis pri li, kaj pri lia kuraĝa kaj konstanta laboro por la bono de la homaro. Inter la parolantoj troviĝis amideano Petro Ye, Vicprezidanto de la Asocio, samideano Davido, universitata profesoro, kaj Aŭgusto 分发作业 Casquero de la Cruz, hispana esperantisto. La salono estis plenplena. Fakte eĉ mankis sidlokojn. Fine de la solenaĵo, en vere amikeca kaj agrabla etoso, ĉiuj bankedetis. La manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis malavare alportitaj de la ĉeestantoj. Bonvolu spekti foton.

Aŭgusto 分发作业 Casquero de la Cruz, Ĉinio

SOSSOIS RAPORTAS



Tago « **Socia Forumo** » en Bruselo. La tago ne estis favora pri la nombro de partoprenantoj (+/- 200). Tamen, mi faris mian prelegon antaŭ eta grupo (la aliaj ne estis pli sukcesaj. Eble pro la belega vetero kiu forkondukis la homojn ekstere). Pri la budo. : Mi ricevis, kompare al aliaj, pli da vizitoj. La plimulto estis nederlandlingvaj. Tamen mi ricevis inviton de la FGTB (ABVV-socialista sindikato) de Arlon. Mi atendas nun ties konkretigon. La plimulto estis

11
nederlandlingva. Ili bedaŭris ne ricevi dokumentojn en sia lingvo. Feliĉe, en niaj APE-aj dokumentoj, ni ĉiam mencias la adreson kaj/aŭ la telefonnumeron de FEL. Do mi venas al tiu konkludo : La eventon mi anoncis dum BEF kunveno. Mi ne scias ĉu la anonco atingis la estraron de FEL. La EBG sendependiĝis en 1992 (se mi bone memoras). Oni komprenis ke ĉiu evento en Bruselo estu kovrita de EBG. Jes, sed tie oni eble komprenis ke oni kovros nur bruselajn eventojn. Sed kio pri la naciaj eventoj ? Do, mi prononas ke membro de EBG havu dokumentojn en la nederlanda kaj la franca ĉe li. Tiel oni povas havi dokumentojn por naciaj eventoj. Ĉu mi povas ricevi la liston de la estraranoj de FEL kaj EBG por eventualaj kontaktoj pri estontaj naciaj eventoj ? Estos en oktobro sindikata kongreso en Oostende. Mi petis al Claude Rolin (vicĝenerala sekretario de la CSC-ACV) ĉu mi povos havi budon tie. Li diris ke estas malfacila afero kaj oni nur donos tiun permeson al la movadoj rekte ligitaj al la CSC-ACV kaj ACW-MOC. Li diris al mi ke li rifuzis permeson al aliaj movadoj sed invitis min skribi tamen persone al li. Oni devos traduki dokumentojn specifajn al la sindikata movado. Ankaŭ en la germana tiam ĉar la ACV-CSC kovras la tutan Belgion. Mi jam havas ion valoran de SAT. Se mi ricevas la permeson, tiam oni komencos la tradukojn. Danke al EEU, oni sin montras pli pri eŭropaj aferoj. Sed okazas eventoj en Bruselo kie estus utile sin montri. Kiu povas ŝarĝi sin pri la kalendaro de tiuj eventoj ?

Georges Sossois, Charleroi, Valonio, Belgujo

N.R: Datoj mankas en la raporto. FEL = Flandra Esperanto Ligo. APE = Asocio Por Esperanto.



12

ĈI TIU ESPERANTO ESTUS TURKA se oni legus la intencojn de Zamenhof!

Esperanton kreis viro, kies menso altgrade funkciis virine, per intuicio. Bonŝance li ne estis lingvisto, sed simple lingvo-amanto. Bedaŭrinde postaj generacioj de viroj, kies menso funkcias nur vire provis kompreni ĝin, uzi ĝin kaj perfortis ĝin. Aliflanke Zamenhof estis filo de sia tempo kaj el tio venas la problemoj pri seksismo en Esperanto, kiuj estus tute solveblaj, se oni ne obstinus virece tranĉi ilin per forto kaj gajni kontraŭ la aliaj.

Esperanto naskiĝis en Eŭropo, sed Zamenhof ne volis ĝin lingve hind-eŭropa. "Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn.....Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial. . . ". Li komprenis, kion li volas fari, kvankam li mem ne ĉiam sukcesis sekvi siajn principojn. Postaj generacioj de eŭropaj parolantoj de Esperanto kaj miskomprenis kaj intence provis igi Esperanton pli eŭropa. Rasismo (boninteca, pretervola kaj ne rimarkata) estas alia ismo.

Estas tempo por redoni al virinoj kaj al neeŭropanoj sian lokon en Esperanto, ne tuŝante la Fundamenton.

1. Intencoj de Zamenhof

La intencoj de Zamenhof estis noblaj kaj puraj. Tio estas vera laŭdifine. Li volis fari lingvon, kiu estu facila, regula, sed pli manipulebla ol Volapük. Kun vortaro konsistanta el konataj internaciaj radikoj. Li, do, volis krei Bonan Lingvon, eble ĉefe ĉar li ne tiom interesiĝis pri la lingvo kiom pri la enhavo, la interna ideo, la homaranismo, ktp.

Ĉiukaze li havis grandan intuician ideon. Malice oni povas diri, ke li havis tiun ideon kaj ne foirjetis ĝin, ĉar li ne estis profesia lingvisto sed nur lingvo-amanto. Ĉiuj postaj grandaj lingvistoj (ni citu nur

Jakobson), kiuj provis fari internaciajn lingvojn en la postaj jardekoj alvenis nur al naturismaj meznombraĵoj.

La ideo de Zamenhof estis la jena:

"Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el senŝanĝaj vortoj. Se vi prenos verkon skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas sole kaj ĉiam en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per kuniĝo de senŝanĝaj vortoj.

Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alikonformigis tiun ĉi dismembrigon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), - li eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo."

Tio estas skribita, vere skribita de Zamenhof, ne inventita de mi. Alivorte Zamenhof celis fari lingvon kun neŝanĝeblaj morfemoj, kiel la turka. Sed esperantistoj apenaŭ legis la antaŭparolon de la propraj lernolibroj, kiu, male al tio kion la bona doktoro pensis, ja estas bezona.

2. Kaj kio okazis en la realo.....

Okazis, ke ankaŭ la unuaj esperantistoj estis filoj de sia tempo kaj de "sia lingvo". Jam en la unua jaro Zamenhof estis inundata de reform-proponoj. Oficiale ili ŝuldiĝis al la fakto ke la lingvo ne rapide progresis kaj al la deziro forigi tiujn facetojn de la lingvo, kiu malhelpas ĝian progreson. En la realo temis pri la nekonfesida deziro "malsovaĝigi" Esperanton kaj igi ĝin pli simila al la "grandaj" okcidentaj kulturlingvoj, alivorte al la franca. Same nekonfesinde hodiaŭ la klopodo estas similigi Esperanton al la angla. Jam en 1894 Zamenhof publikigis en La Esperantisto

reformproponaron ampleksan, kiu estis malakceptita de la tiamaĵ esperantistoj.

Kaj jen la tiu proponitaj reformoj (kiuj similas al multaj el la nuntempaj):

- La supersignoj malaperas.

- La c estis elparolata kiel malnova ĥ; z kiel malnova c.

- Artikolo ne plu ekzistas.

- La akuzativo havas la saman formon kiel la nominativo.

- En multenombro la substantivoj anstataŭas -o per -i.

- La adjektivo finiĝas, same kiel la adverbo, per -e kaj ne ŝanĝas sian formon.

- La tabelaj vortoj estas anstataŭataj per vortoj prenitaj el la naturaj lingvoj.

- La prepozicio ĵe estas unue forigata sed poste aperis en la reformita vortaro.

Kaj jen ekzemplo de la reformita lingvo:

Unuaj vortoj de Patro nia: Patro nua kvu esten in cielo, sankte estan tue nomo, venan regito tue, estan volo tue, kom in cielo, sik anku sur tero.

kaj kelkaj ekzemploj el la vortareto proponata:

- borgeso (= burĝo)

- kavalo (= ĉevalo)

- omnu (= ĉiu)

- koruso (= ĥoro)

- jovedo = jaŭdo

- meilo (= mejlo)

- epolo (= ŝultro)

- sik (= tiel)

En 1909 aperis al unua oficiala aldono al la Universala Vortaro produktita de la tiama Lingva Komitato (nuna Akademio).

En ĝi la agado de la kaŝeŭpistoj estas ankoraŭ pli evidenta.

Jen kelkaj ekzemploj laŭ grupetoj.

En la unua grupo estas vortoj, kiuj rekte kontraŭstaras la vorto-faraĵon de Esperanto laŭ la Fundamentaj reguloj. Ĉu vi memoras pri la dismeto de la ideoj, kiun havis en la menso Zamenhof?

antipatio: malsimpatio aŭ malinklino

anonima: sennoma

tragicomedio: tragedio, kies finiĝo estas feliĉa

Ni ne komentu pri la enkonduko de la radikoj "tragi-", kiu ŝajne validas nur en ĉi tiu okazo.

Eble ankaŭ

antipodo: loko de la tero, kuŝanta sub niaj piedoj sur la alia duonglobo

estas parto de la enkonduko de la radikoj "anti-" tre vivanta ankaŭ nuntempe en, ekzemple, "antisemit-", kiun mi nomus "kontraŭ-ŝem-id-".

La dua grupo rilatas al la fifama sistemo geografio-geografo, kiu firmigas sian ĉeeston,

kaj donas eblecojn al postaj generacioj fari multe pli da strangaĵoj.

filozofio: scienco pri la esencaj plej ĝeneralaj principoj kaj kaŭzoj de la estado.

filozofo: scienculo, kiu esploras kaj pritraktas la filozofion.

mito: tradicia fabela rakonto pri antikvaj dioj kaj praaj tempoj.

mitologio: tradiciaj fabelaj rakontoj de la antikvuloj pri la dioj kaj duondiaj herooj.

filologio: scienco, kiu . . . esploras la lingvojn kiel organojn de la spirita vivo de la popoloj.

filologo: scienculo, kiu studas la filologion

astrologio: arto diveni ion estontan laŭ la astroj

astrologo: astrologiisto

astronomio: scienco pri la astroj

astronomo: astronomiisto

filantropo: humanulo, homaramanto aŭ bonfarema homo

filantropio: humaneco, homaramo aŭ bonfaremo

teologio: metoda studo pri Dio kaj diaj aferoj

teologo: teologiisto

lom aparta estas la pozicio de:

inkvizicio: mezepoka eklezia institucio kaj tribunalo.

inkvizitoro: membro de la inkvizicia tribunalo

Generale abundas okcidentaĵoj:

manuskripto: manskribaĵo, skribaĵo destinata por presiĝo.

beletristiko: literaturo laŭ la artisma vidpunkto.

depeŝo: urĝa sciigo, sendita per rapida vojo, precipe per telegrafo.

kavalerio: parto de armeo konsistanta el rajdsoldatoj.

spado: glavono konsistanta el longa, rekta, mallarĝa, pinta kaj unutanĉa aŭ dutranĉa klingo kun tenilo

adjutanto: oficiro, kiu komunikas al la subuloj la ordonojn de generalo

aŭtentika: nedubeble certa, vera aŭ originala, oficiale certigita

hekatombo: buĉfero el cent bovoj, ĉe antikvuloj.

La verkon de la tiama Lingva Komitato daŭrigis kun elano la postaj generacioj, en kiuj oni konstante plu provis forigi la radikojn ĝermanajn aŭ rusajn enkondukitajn de Zamenhof. Se li mem ne estus protekstinta per la Fundamento vortojn kiel "fingro" kaj "tago" kaj "prava", nun ni certe dirus "deto", "ĵurneo" kaj "rajta". Preter la ŝerca tono, efektive statistikaj kalkuloj pri la morfemaro de Esperanto de la Universala Vortaro tra Plena Vortaro ĝis Plena Ilustrita Vortaro, montras ke la procentaĵo de enkondukitaj morfemoj nek francaj nek anglaj praktike emas reduktiĝi al nulo en la lastaj tempoj. **Renato Corsetti, UEA eksa prezidento**

ORELLANA NEAS FRAŬDON

Skismo en la estraro de ILEI, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, faka asocio aliĝinta al UEA, iĝis publika en Julio 2008, post kiam la vicprezidanto, Zsófia Kóródy, estis eksigita el sia posteno. Reage al la eksigo ŝi dissendis al la komitatoj de ILEI atentigon pri tio, ke jam dum du jaroj mankis buĝetplano kaj ne estis faritaj la financaj raportoj, kiujn postulas la statuto de la asocio. La financojn de la asocio laŭ ŝi regis ĝia sekretario Atilio Orellana Rojas, kaj aliaj estraranoj, kiuj ne donas informojn al la ceteraj estraranoj nek al la komitato.

La 22-an de julio 2009, la Komitato de ILEI, elektis novan 7-membran estraron. Ne estis reelektitaj Atilio Orellana Rojas kaj Aida Ĉiĉikaité, la motoroj de la antaŭjara detronigo de Zsófia Kóródy el vicprezidenteco. Kiel prezidanto de ILEI elektiĝis la konata pedagogo el Nov-Zelando kaj Hungario, Stefan MacGill kiu respondecos pri eksteraj rilatoj kaj kunordigo. Vicprezidanto Duncan Charters (Britio/Usono) okupiĝos pri universitata agado kaj instru-teknologia evoluo. Małgorzata Komarnicka (Pollando/Germanio) estas sekretario kaj Juliĵa Batrakova (Rusio/Nederlando) kasisto. La antaŭa prezidanto Radojica Petrović (Serbio) estis taskita pri edukaj projektoj kaj informado, kaj Zsófia Kóródy (Hungario/Germanio) pri ekzamenoj, Esperanto-centroj kaj instrukapbligo. La fakoj de Julián Hernández (Kubo) estas lerneja kaj landa agadoj. El la antaŭa estraro nur Petrović kaj Kóródy estis reelektitaj, sed MacGill kaj Charters membris en la estraro de ILEI jam pli frue, respektive kiel vicprezidanto kaj prezidanto.

Miloj da eŭroj senspure malaperis el la banka konto de Internacia Esperanto-

Instituto, IEI, en Hago, rakontas bone informitaj fontoj fine de 2009. La estraro de IEI laŭ la samaj fontoj longe ne konsciis pri la liko en la konto, ĉar al ĝi estis prezentataj falsaj konteltiroj. Re prezentantoj de IEI ne respondas al mesaĝoj pri la asertata fraŭdo. Same ne respondas demandojn Atilio Orellana Rojas, la direktoro de IEI, kiu estis urĝe devigita forlasi sian postenon kaj sian loĝejon en la konstruaĵo de IEI.



En decembro 2009 Libera Folio publikigis artikolon pri malapero de miloj da eŭroj el konto de IEI kaj pri la subita maldungo de Atilio Orellana Rojas, la direktoro. Antaŭ la publikigo de la artikolo Libera Folio plurfoje petis Atilio Orellana Rojas komenti la temon, sed neniu respondo alvenis. Nun, pli ol tri monatojn post la apero de la artikolo, li sendis al Libera Folio leteron, en kiu li asertas, ke pri eventuala monomanko en kontoj de IEI kulpas ne li, sed probable "nepotismo, investo en privataj projektoj kaj la kutimo senkvitance en- kaj elspezi por eviti la pagon de impostoj". Lia propra monŝuldo al IEI laŭ li temas pri nepagitaj luoj, kiujn li pretas sed ne kapablas pagi. Libera Folio aperigis la leteron de Atilio Orellana Rojas, laŭ lia peto. **Laŭ Libera Folio**

97a U.K. 2012 EN HANOJO

La elekto de Hanojo kiel la urbo de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto en 2012 estis la plej rimarkinda decido de la Estraro de UEA, kiu kunsidis en sia plena konsisto en la Centra Oficejo ekde la 10-a ĝis la 12-a de januaro. Ĝis la lasta momento ankaŭ la korea urbo Busan konkursis, kun alloga oferto, pri la rajto okazigi la Kongreson, sed post longa diskuto la Estraro decidis favore al la vjetnama ĉefurbo. La Esperanto-movado de Vjetnamio havas jam longan historion, sed la Universalan Kongreson ĝi gastigos por la unua fojo.

La nuna Estraro kunsidos ankoraŭ komence de la ĉi-jara UK en Havano, kie ĝi tamen traktos nur lastajn teknikaj detalojn de la kongresa programo. Kutime la Estraro havas plenkunsidon en Roterdamo en marto-aprilo, sed ĉi-foje la kunsido estis plifruigita kaj okazis tuj post la ceremonio por la publikigo de festlibro por Humphrey Tonkin. La tradicia printempa kunsido fariĝis do vintra. La estraranoj devos ankoraŭ trakti kaj decidi pri multaj aferoj rete, ĉar pro la frua kunsidodato ekz. la financaj dokumentoj ne povis jam esti pretaj. Tio lasis al la estraranoj pli da tempo por interŝanĝi ideojn interalie pri stimulado de la nun okazanta diskuto pri nova strategia plano por UEA. Tiurilate ili atendas multe pli da aktiveco de la komitatoj, sed ili klopodos pli vaste altiri ankaŭ membrojn kaj aliajn esperantistojn en la diskuton pri tiu dokumento, kiu devus difini la plej irindan vojon por UEA dum la venontaj dek jaroj.

Kun Stefan MacGill, prezidanto de ILEI kaj ĝia observanto ĉe la Estraro de UEA, oni parolis pri la plua evoluigo de la instrua agado. La Estraro gratulis ILEI pro la sentebla plivigliĝo de ĝia agado post la pasintjara konferenco. Kun granda kontento oni notis la bonan starton de la Esperanto-ekzamenoj laŭ la normoj de la Eŭropa Referenckadro. Pri tio raportis

15
Katalin Kovats el edukado.net, membro de la UEA-komisiono pri la novtipaj ekzamenoj. Por fina aprobo de la Komitato oni sendos proponon pri ĝisdatigaj modifoj en la interkonsento inter UEA kaj ILEI pri la instrua agado. La interkonsento estis aprobata en la UK en Havano en 1990 kaj estos do reviziita en la dua Havano UK. La propono estis jam aprobata de la estraro de ILEI, kies komitato siavice traktos ĝin en la ILEI-konferenco en Matanzas.

Por la nova serio de elstaraj sciencaj verkoj, "Scienca Penso", en kiu jam aperis "La origino de specioj" de Darvino, la Estraro aprobis regularon kaj envicigis por aperigo kiel ĝia dua titolo la verkon "Lingvo kaj menso" de la fama lingvisto Noam Chomsky. Kiel observanto de TEJO partoprenis la kunsidon la nuna TEJO-volontulo Alexandre Baudry, kiu raportis i.a. pri la baldaŭa apero de la eldono 2010 de gastigantoj de la Pasporta Servo kaj pri la planata grafika reformo de la revuo "Kontakto". Osmo Buller, Gazetaraj Komunikoj de UEA

PAJOTTENLAND 30a MAJO

Je dimanĉo FEL invitas vin senpage al "Tago en Pajottenland" kun promeno, pikniko kaj vizito al ventmuelilon kaj muzeon Hertboom. Kontakto: horizon.taa@skynet.be 0478 210 279 Lode van de Velde, prezidanto de Flandra Esperanto Ligo, Antverpeno. Kunveno je la 10h15 je la haltejo "Pamel Schoon Verbond" (Belle Alliance), Ninoofsessteenweg(N8).

SERĈPROMENADO GENT 5a JUNIO

La Esperanto Klubo de Gent, nomata "La Progreso" 09 230 1677, Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge, invitas vin je sabato, al ĝia kutima serĉpromenado. Ĉi-foje la temo estas la rivero Leie (La Lys). Foriro je la 13h30 el la "Vredeshuis", 9 Sint-Margrietstraat, alveno je la 18h30 por vespermanĝo en la "Domo de la Paco" apud "Gravensteen" (Grafa Kastelo).

16

NI FESTIS EN SKOKOVY

La 30a jubilea Lingvo-seminario okazis de la 12a ĝis la 18a de aprilo 2010 en Ĉeĥio, en la kutima loko de la Ĉeĥa paradizo. Ni okupis la pensionon Espero en la vilaĝeto Skokovy. La aranĝon organizis AEH-klubo de la urbo Pardubice kaj la programon ellaboris kaj lerte gvidis Jana Křížková el la urbo Česká Třebová. Inter 45 gesamideanoj, precipe el Ĉeĥio, venis gastoj el Slovakio, Pollando, Germanio, Nederlando kaj Francio.

Lunde, dum la inaŭgura vespero, la prezidanto de AEH Pavel Nechvíle bonvenigis la partoprenantojn, Jana anoncis la detalan ĉiutagan programon kaj poste estis prezentita filmo pri la tridekjara historio de la aranĝoj en Skokovy. La plej fidelaj partoprenantoj ricevis memorigan ateston kaj donaceton.

Ĉiutage, antaŭ la matenmanĝo, okazis gimnastikado, kiun gvidis Jana. Je la 9a horo komenciĝis la instruado en tri-nivelaj E-kursoj. Post la tagmanĝo estis libera tempo por piedpromenoj en la bela ĉirkaŭaĵo kaj al turismaj allogaĵoj. Dum la posttagmezaj manlaboroj oni fabrikis papiliojn el perloj aŭ el paperaj teosaketoj. La vesperoj estis dediĉitaj al pli kompletaj prelegoj.

Marde vespere Magdalena Fejfičová el Slovakio montris surekrane kaj parolis pri la historio de la slovakaj mono kaj pri la eŭro. La prelego estis tre interesa kaj plaĉa.

Merkrede posttagmeze estis antaŭvidita ekskurso al Pěčín. Tie ni vizitis farmbienon kie oni bredas kaprinojn kaj fabrikas fromaĝojn. Ni spektis filmon pri la produktado de fromaĝo, poste ni gustumis divers-spicigitajn produktojn kaj povis aĉeti ilin. En la sama loko troviĝas vitro-

produktejo, kiun ni ankaŭ vizitis. En la urbo Železný Brod ni povis vidi produktadon de rulitaj bidoj kaj etnografian ekspozicion en la loka muzeo Bělišťe. Ĝi estas la plej granda ĉizita konstruaĵo en Železný Brod. Vespere ni eksciis pri preparado de diversnaciaj specoj de pudingoj. Konataj estas ĉirkaŭ 80 variantoj; dolĉaj kaj salaj. Sekvis interesa inform-prelego pri diversaj arboj kaj filmo pri la Internacia Festivalo kiu okazis jarfine en Germanio.

Ĵaŭde vespere la partoprenantoj povis spekti filmojn pri Venezuelo, gustumi tkonfititan frukton, gojaron, kaj admiri ekspozicion pri kelkaj muzikiloj, albumoj, bildkartoj kaj diversaj memoraĵoj. Dum dancado ekestis gaja etoso kaj muzikado.

Vendrede, post la promenado, Jarda Pokorný interese rakontis pri mineraloj kaj ŝtonoj trovitaj dum promenado kaj ankaŭ pri aliaj arbaraĵoj. Li instalas interesan ekspozicion de la trovitaĵoj. Je la 20a horo komenciĝis gaja vespero per vin-tostado. Sekvis kantoj, poemoj, spritaj versaĵoj, anekdotoj, kvizo, amuzaj scenoj kaj ŝercoj. Riĉa tombolo altiris partoprenantojn kaj baldaŭ ĉio estis distribuita. Poste ni komune kantis esperante, ĉeĥe kaj eĉ ruse ĉe gitar-akompano.

Sabate estis la lasta tago por profiti la kutiman tutagan programon. Vespere ni havis okazon aŭdi interesan prelegon pri la grafino Bertha von Suttner, kiu estis la unua virino premiita per Nobel-premio. Ŝi ankaŭ parolis Esperante. Per tio la programo finiĝis. Ni ankoraŭ restis en amika rondo kantante kaj babilante.

La aranĝo estis tre sukcesa, ni ĝuis tre agrablan semajnon en amika rondo.

Liba Gabalda, Francujo



30a jubilea E-seminario en Skokovy



12 - 18 aprilo 2010



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



5a Sabla Printempo

30a jubilea E-seminario en Skokovy



en la urbo Pöck - Ĉeĥio



9 - 11 aprilo 2010



12 - 18 aprilo 2010



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

ESPERANTUMADO

Majo 2010

- 1 Michael Cwik festis 70an jubileon, 70an jaran datrevenon de la 28an de Aprilo
- 7-9 Kongreso en Aalen, Germanujo, de BRAVELO - Baden-Virtemberga E-o Ligo
- 8-15 62a Kongreso de IFEF, Internacia Fervojiata E-o Federacio, Sofio, Bulgarujo
- 13-16 Kongreso Beneluksa en Antverpeno
- 21-24 Kongreso Germana-Franca en Kauserslautern
- 27-31 21a REK, Rusa E-o Kongreso, St.Petroburgo, post-kongreso en Moskvo (1-6/6)
- 30 Tago en Pajottenland, Flandrio, horizon.taa @ skynet.be 0478 210 279 Lode van de Velde

Junio 2010

- 5 Serĉpromenado, Gent, La Progreso, 09 230 1677, Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge
- 4-7 105a Skotlanda Kongreso en Berwick-upon-Tweed
- 15-23 32a Ĉebalta E-o Printempo en Mielno, Pollando
- 19-23 6a Azia Kongreso, en Ulanbatoro, Mongolujo
- 26-07 46a BET, Visaginas, Litovujo, Baltiaj E-o Tagoj
- 27-03 63a IKUE Parizo, Katolika Kongreso, Francujo

Julio 2010

- 2-6 69a Kongreso de Hispana E-Federacio en Santiago de Compostela, Galegujo
- 7 20a geedziĝa jubileo de Ella kaj Eddy Strug-Van Den Bosch, balfesto 3a Julio
- 17-24 95a Universala Kongreso en Havano, Kubo

Aŭgusto 2010


- 1-6 83a Kongreso de SAT, Sennacia Asocio Tutmonda, en Braŝovo, Rumanujo
- 14-24 14a Renkontiĝo Internacia en Plouezec, Bretonio, Francujo

Septembro 2010

- 24-26 26a ARKONES, Poznan, Pollando

Oktobero 2010

- 2-9 18a Internacia E-o Semajno de Kulturo kaj Turismo kaj Turismo, Coma-Ruga, Tarragona



BERNARD-REGIS LARUE



Dumviva Membro de EBG, elstara preleganto kaj amatora astronomisto